

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

Gratulojn!



Prof. D-ro IVO LAPENNA
festas du jubileojn

N-ro 632-3 (7-8)

Jul/aŭg 1958

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

W. Dostyeh

esperanto

JUL/AŬG 1958

5 1 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 632-3 (7-8)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro:

MAG. W. AULD, Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964 Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estrararo de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Enhavo

Prof. D-ro Ivo Lapenna tridek jarojn esperantisto, dudek jarojn estrarano de U.E.A.	113
La Venko en Montevideo	113
Ivo Lapenna, vivo kaj laboro	114
En "Enketo pri Esperanto"	116
Pensoj post Montevideo, William Auld	116
Estas formita la Internacia Organiza Komitato	117
Unua Listo de la membroj de la Internacia Patrona Komitato	118
Grava informo	118
Progresoj kaj mankoj de nia informado	119
Tabela trarigardo pri la informa laboro en 1957	120
Reciproka aprezo de la okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj	122
La muzikisto-poeto de la kongreslando	123
Precizigo pri la K.G.S.	125

Rubrikoj

La internaciaj konkursoj	115
Nekrologo	125
Radio	124
43-a U.K.	125
Oficiala Informilo	125

Manuskriptoj por „Esperanto” devas esti klare tajpitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco, en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

PROF. D-RO IVO LAPENNA

Tridek Jarojn Esperantisto
Dudek Jarojn Estrarano de U.E.A.

La supraj faktoj meritas gratulojn kaj bondezirojn al la jubileanto — sed ne malpli al ni mem, ne malpli al la Esperanto-Movado, ĉar ĝi disponis dum tiom da jaroj pri tiel kompetenta kaj eminenta kunbatalanto kaj gvidanto. Kaj daŭre ankoraŭ disponas pri li — dank' al la senkomparaj kvalitoj kaj meritoj de la Internacia Lingvo Esperanto. Dank'al tiu lingvo, kiun li tiel profunde ekamis, dank'al la Esperantismo, kiun li tiel plene sentas identa al la propra vivkoncepto, ke neniam plu estos eble al li forlasi ĝin.

Povas veni helpoj aŭ malfacilaĵoj, povas veni esperoj aŭ seniluziiĝoj, bonvolo aŭ atakoj, sukcesoj aŭ malvenko, povas esti dolĉaj aŭ amaraj la sentoj — pri daŭrigo, pri persisto kaj obstino, ne povas esti demando. Antaŭen.

Malfacila kaj peza estis la vojo laŭ kiu li pionire kondukis la postmilitan movadon al pozicioj, kiujn ĝi nun nur komencas okupi. La sama vojo laŭ kiu li senĉese montras pluen.

Elstarega mejloŝtono sur tiu vojo estas la brila sukceso de Montevideo. Sola en marĉo de nescio kaj neinformiteco, de malbonvolo kaj antaŭjuĝo, paŝon post paŝo, tagon post tago, per centoj da konversacioj kun ĉiaj delegitoj, ŝajnis pliboniĝi la situacio ĝis reala bona ŝanco post tri semajnoj. Sed triminuta vulgareco rompis ĉion. Perdita afero — ŝajne. Sed ne por homo, kiu ne toleras humiligon kaj ridindigon de afero sankta al li. Ne por homo, kiu en plej senesperiga situacio fariĝas plej forta. Kvin minutoj sufiĉis por decidi pri batalplano. Kvin tagoj sufiĉis por atingi kompletan sukceson sen precedencan kaj en la historio de UNESKO kaj en la historio de U.E.A.

La okazaĵoj de Montevideo, la raportaro publikigita en la februara numero de "Esperanto" 1955, la pli malpli privataj detaloj rakontitaj kaj skribitaj al amikoj, ĉio ĉi montras la homon Lapenna kompleta. Leono, kiam la cirkonstancoj postulas agi leone.

Kiel pri ĉiuj grandaj aferoj, ankaŭ pri la valoro kaj signifo de la Montevidea afero la samtempuloj ne ĉiuj estas konsciaj, ne ĉiuj scias juĝi objekte. Ne gravas. La historio parolos kaj ora paĝo ĝi estos en la historio de la Esperanto-Movado.

Kaj nun, en tiu ĉi por U.E.A. kaj por li mem jubilea jaro, D-ro Lapenna staras preta kun sia tuta kompetenteco, kun sia tuta intelekto, scio, kapablo, lerteco, morala kaj fizika forto, por konduki la Movadon al plia granda mejloŝtono, al brila tutmonda honorigo de la iniciatoro de Esperanto. Sian plenan personecon li disponigas por tio, kio kun ĉies helpo devos fariĝi senkompara, unika manifestacio: La Zamenhof-jaro. Ke la Movado sciu tion taksu kaj profitu. Ke ĉiu esperantisto helpu lin kaj nin ĉiujn laŭ siaj povoj por realigi ĉiujn planojn. Pli bela jubilea donaco al D-ro Lapenna ne estos imagebla.

KONTRIBUU AL
FONDAĴO - ZAMENHOF!

La Venko en Montevideo

Ĉefartikolo el la februara numero
1955 de "Esperanto"

Kiel novjara saluto, certe kun aplaŭdo akceptita de vi ĉiuj, aperis en la januara numero la Rezolucio akceptita de Unesko.

La esperantistaro kun entuziasmo apogis la ideon, ke UEA sendu reprezentanton al la konferenco en Montevideo, kaj ofereme kontribuis por realigi tion.

Renkontis nian reprezentanton, D-ron Lapenna, amasoj da obstakloj, kiuj necesigis lukton ĝis la plej lasta momento de la konferenco. Ĝisekstreme li devis streĉi siajn fortojn por konduki la ŝipon en la havenon. Plurfoje rokoj, ŝajne neeviteblaj, minacis, sed la lerta kondukisto kapablis sekurigi la veturon ĝis la celo. Pri sia komisiono li rakontas en tiu ĉi numero nervotiklan historion.

D-ro Lapenna plenumis sian komision perfekte. Kaj je la reveno en Eŭropon li akceptu niajn plej korajn kaj sincerajn komplimentojn!

La lukto en Montevideo estas finita. Novaj perspektivoj malfermiĝis. Ne estas permesate nun resti pasiva, meditante pri la venko atingita. Nun ni devas eluzi la venkon, ĉar se ni ignoras tion, ni vane ekagis. Estas la tasko de vi ĉiuj utiligi la rezolucion laŭ plej taŭga maniero. Kaj estas la tasko de UEA subteni, doni konsilojn kaj liveri dokumentojn pri tio. Estos aparte la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de UEA (= CED), sub gvido de D-ro Lapenna, kiu devos transpreni tiun fakon. Sed la agado de CED grandparte dependas de la mono disponebla. Mi apelacias al vi, ke vi—kiel dankesprimon al D-ro Lapenna—faru vian donacon al CED por doni al ĝi eblecon labori kiom eble plej amplekse.

Vivu Esperanto!

E. Malmgren,
(tiam) Prezidanto de UEA.

IVO LAPENNA - VIVO KAJ LABORO

Ivo Lapenna naskiĝis la 5-an de novembro 1909 en Split (Dalmatio), kiel filo de inĝeniero. Li tie finis gimnazion. En Zagreb li finis juran studon, sed tie li finis ankaŭ muzikan lernejon. La muzikan talenton li heredis de sia patrino, kiu estis konata pianistino. Post la muzika studo li ludis violonĉelon en pluraj koncertoj.

Sed, samtempe li estis granda sportulo kaj plurfoje estis nacia ĉampiono atletika.

Kiel studento li fariĝis esperantisto en 1928, fondis la societon "Akademia Esperantista Klubo" kaj estis ĝia prezidanto ĝis eksplodo de la milito.

Ĉio ĉi ne malhelpis lin doktoriĝi jam en 1932, nur 23-jara. De tiam li praktikis ĉe tribunalo kaj kiel advokato. En 1937 li fariĝis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (post la milito: Federacio) kaj multegon kontribuis al la evoluo de la jugoslavia Esperanto-movado je unu el plej bonaj, kulturaj kaj prestiĝhavaj naciaj movadoj. Li verkis la lernolibron "Esperanto u 10 lekcija" en kroata lingvo kaj gvidis sennombrajn kursojn.

En 1938 li fariĝis komitatano kaj estrarano de U.E.A. Baldaŭ intervenis la milito, dum kiu li partoprenis la naciliberigan batalon en Jugoslavio. Sennombrajn elstarajn esperantistojn, fidelajn amikojn, kremon de la jugoslavia movado li vidis falantaj ĉirkaŭ ŝi en tiu terura tempo, pri kiu eksterulo ne havas imagon, pri kiu eĉ tiuj, kiuj siatempe aŭdis lian konsternan kaj kortuŝan prelegon pri la naciliberiga milito, ricevis nur palan bildon. Ĉu mirige, ke post la lasta pafo, post la lasta bombo homo, ĉion ĉi vidinta kaj suferinta kaj sentanta la Esperantiston en la sango, havas alian sintenon en la movado, pli firman, pli senkompromisan, pli absolutan ol homo, kiu ne vidis fremdan soldaton en sia lando, kiu daŭrigas sian esperantistan kromokupon kiel antaŭe kaj mildmiene predikas: "Estu paco"?!

Finiĝis la teruraĵoj, restariĝis la movado ĉie, nacie kaj internacie, rekonstruiĝis pene normala kultura vivo. Tuj ĝi okupis ankaŭ D-ron Lapenna, kiu estis nomita profesoro pri internacia juro kaj historio de diplomatio en la universitato de Zagreb, kiu estis vokita al Pac-Konferenco en 1946 en Parizo, kiu estis ŝarĝita pledi antaŭ la Internacia Kortumo en Hago en 1947/48, kiu estis elektita membro de la Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj en Zagreb en 1948.

Tamen — en 1949 li forlasis Jugoslavion kaj ekloĝis kiel rifuĝinto unue en Parizo, poste en Londono. Li fariĝis membro de la "Académie Internationale Libre des Sciences et des Lettres" kaj de la "International Law Association". Li

trovis okupon kiel kunlaboranto de la franca scienca institucio "Centre National de la Recherche Scientifique" kaj verkis laŭ ĝia komisiono "Conceptions Soviétiques de Droit International Public", verko laŭdata pro ĝia strikta objektiveco en ĉiuj gravaj fakaj revuoj pri internacia juro en la mondo. Poste, en Londono li establiĝis kiel jura konsultisto kaj fariĝis kunlaboranto en la fakoj de Internaciaj Studoj en "The London School of Economics and Political Science" de la Universitato en Londono. Ankaŭ laŭ komisiono de tiu institucio li nun verkas ampleksan studon pri temo de internacia juro.

Sed intertempe li rekaptis la fadenojn de la internacia Esperanto-movado kaj celtrafe kondukis ĝin al ĉiam pli bonaj rezultoj. Kiel estrarano pri kongresoj li reorganizis la Internacian Someran Universitaton kaj donis al ĝi konkretan regularon. Li enkondukis Belartan kaj Oratoran Konkursojn kun difinitaj regularoj kaj metis la bazon por Kongresa Gazetara Servo funkcianta dum la tuta jaro. Li starigis la Internacian Gazetaran Servon, kies bultenoj ĉiam pli enpenetras la nacian gazetaron de plej diversaj landoj. Li reorganizis la Internacian Informan Fakon, kies gvidanto li daŭre estas, kaj konstruis reton de naciaj kunlaborantoj. La rezultoj respeguliĝas en konstante pliboniĝanta informlaboro monda, kiel montras la ĉiujaraj raportoj en la jul/aŭg-numero de la revuo.

En 1952 li fondis unu el la plej gravaj institucioj de la movado, la Centron de Esploro kaj Dokumentado kaj daŭre funkcias kiel ĝia honorofica direktoro. En mallonga tempo li sukcesis kolekti grandan kvanton de dokumenta materialo kaj donis al ĝi bazon de scienca esplorado, nepre bezonata por enpenetrado en oficialajn kaj sciencajn mediojn. C.E.D. mem eldonis grandan nombron da dokumentoj kiuj estas regule sendataj al multaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj kaj kiuj grave kontribuas al la prestiĝo de la Esperanto-movado en ĉiaj medioj. Ĉiam kaj ĉie, en la fono de ĉiu agado de D-ro Lapenna estas la celo altigi la dignon kaj prestiĝon de la movado al nivelo adekvata al la valoro de la Internacia Lingvo Esperanto, tiel ke homoj kiuj permesas al si kraĉi al ĝi — kiel okazis en Montevideo — tion peze pagas.

Se nenion alian Prof. Lapenna estus farinta por la Esperanto-movado ol tion, kion li faris en Montevideo, tio jam plene sufiĉus por skribi lian nomon per oraj literoj en la historio de Esperanto. Nur liaj plej proksimaj kunlaborantoj scias kiom da antaŭpreparoj estis faritaj dum la tuta jaro,

kiom da cirkuleroj, kiom da leteroj, kiom da interparoloj estis necesaj por aktivigi la esperantistaron, por ke ĝi kunlaboru laŭ sia povo, por ke ĝi kontribuu per objektoj aŭ mono por la Universala Ekspozicio, por ke ĝi prizorgu publikigojn en la nacia gazetaro, por ke ĝi sole per sia fido kaj fidelo subtenu la aŭdacan entreprenon. Tamen, portata de la opinio de dek ses milionoj, tro aŭdaca ĝi ja ne estis! Kaj venis la venko, inspirita kaj de la en La Harlema Kongreso al li citita kuraĝigo ke "ne necesas esperi por entrepreni", kaj de la justeco de la defendata afero.

Post Montevideo, senĉese li sugestis per cirkuletoj kaj informoj, direktitaj precipe al la landaj asocioj, kiamaniere agi por utiligi la atingitajn poziciojn. Malgranda estas la peno farenda por tion plenumi kaj granda estas la rezulto, atingebla en monda kadro per tiu plenumo, sed bedaŭrinde, ne ĉiam tio estas komprenata, kiel montras liaj raportoj.

Liaj aktivecoj por daŭra plibonigo de la eksteraj rilatoj de la Asocio kaj Movado ĝenerale, ne malhelpas lin aktivi ankaŭ alimaniere, per verkado kaj parolado. Kiel oratoro li akiris famon tra la tuta mondo per siaj festparoladoj dumkongresaj — perloj de oratora arto — kiel ankaŭ per sen nombraj prelegoj en multaj landoj, paroladoj je plej diversaj okazoj, lekcioj en la Somera Universitato.

Lia oratoreco faris lin aŭtoro de eminenta verko "Retoriko", kies dua eldono aperas en tiuj ĉi tagoj, pli kompleta, pli ampleksa, pli bela ol la unua eldono, kiu, aperinta en 1950, estis elĉerpita jam de kelkaj jaroj. Verko, elstara pro kompetenteco kaj stilo, leginda por ĉiu esperantisto kiu deziras ĝui belan lingvon kaj interesan enhavon — kaj precipe por ĉiuj kiuj iam levas la voĉon por paroladi aŭ nur paroladeti ĉu en grupo, intima rondo, en granda kunveno aŭ kongreso.

En 1952 aperis lia verko "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo", populare verkita libro pri la internaciaj problemoj, interesaj por esperantistoj, kiuj ja jam pro la sola fakto ke ili estas esperantistoj bezonas pli da scio pri translimaj problemoj ol homoj, kies pensoj estas limitaj per nacia lingvo.

En 1954 U.E.A. eldonis urĝe bezonatan dokumentan verkon "La Internacia Lingvo, Faktoj pri Esperanto", kiun redaktis Prof. Lapenna laŭ materialo kolektita de li mem kaj de pluraj kunlaborantoj, inter kiuj precipe S-ro Hans Jakob pri la historio, S-ro Reto Rossetti pri la literaturo kaj S-ro William Auld pri la bibliografio. La verko estas grava fonto por ĉiu, kiu serĉas iun ajn informon pri la movado antaŭ 1954.

Multon ni skribis por doni impreson pri la laboroj de D-ro Lapenna por la bono de la Esperantomovado. Sed malfacile estas doni karakterizon pri lia tuta personeco, tiel multflanka.

Kelkaj homoj konas lin nur de unu flanko, kelkaj nur de alia. Iuj, kiuj vidas lin nur dum kongresoj, kie ĉiu minuto estas okupita, kie li devas kuri de kunsido al kunsido kaj ofte ne havas okazon manĝi, pensas ke li ne volas paroli kun ordinarnaj kongresanoj kaj tute ne komprenas, ke simple li ne povas. Aliaj scias, ke kiam la cirkonstancoj permesas tion, li tre volonte amikece babilas kun ĉiu ajn esperantisto.

En tiu ĉi momento ni staras antaŭ la Kongreso en Mainz. Certe ankaŭ tie li estos ege okupita kaj estos malfacile kapti lin por privata interparolo. Sed dum tiu Kongreso estos unu momento, dum kiu ĉiu ĉeestanto havos eblecon esprimi siajn sentojn al nia Ĝenerala Sekretario. Ĉar tie, U.E.A. dediĉos mallongan ceremonieton ¹⁾ al la persono de la jubileanto. Ne ĉar ni ŝatas "adori" iun "heroon", sed ĉar ni respektas kaj estimas unu el plej talentaj gvidantoj de la Esperanto-Movado, kiu estis kaj estas preta dediĉi al ĝi senproporcie grandan parton de sia tempo kaj tutan sian riĉan personecon. Kio estas Beethoven por la muziko, kio estas Churchill por la politiko, tio estas Lapenna por la Esperantomovado.

¹⁾ Por detaloj oni bonvolu turni sin nur al la direktorino de la C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1958

Stato je la 31-a de majo 1958

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Brazilo	7011	7088	101.09
2.	Germanujo	6865	6271	91.35
3.	Nederlando	5567	5009	89.98
4.	Svedujo	6945	6120	88.12
5.	Britujo	6963	5897	84.70
6.	Usono	3225	2490	77.21
7.	Svislando	2185	1660	75.97
8.	Francujo	7647	5768	75.43
9.	Belgujo	1907	1422	74.57
10.	Hispanujo	2508	1750	69.78
11.	Finnlando	2765	1875	67.81
12.	Danlando	2743	1770	64.53
13.	Italujo	4030	2500	62.03
14.	Pollando	6150	3755	61.06
15.	Norvegujo	2144	1273	59.47
16.	Jugoslavio	3800	2010	52.89

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	560	605	108.03
2.	Aŭstralio	1228	1240	100.97
3.	Izraelo	240	240	100.—
4.	Kanado	440	415	94.32
5.	Aŭstrujo	1505	1325	88.04
6.	Sudafriko	235	205	87.23
7.	Islando	315	260	82.54
8.	Japanujo	1280	1055	82.42
9.	Novzelando	955	785	82.20
10.	Urugvajo	414	265	64.01
11.	Maroko	659	355	53.87
12.	Argentino	1005	495	49.25

En „**ENKETO PRI ESPERANTO**”,

broŝuro eldonita de Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago, oni trovas jenan konfeson de Prof. Lapenna :


Kiel 15-jara junulo, en la 6-a klaso de gimnazio, mi la unuan fojon eksentis la ŝarĝon de lernado de pluraj lingvoj. Mi bedaŭris, ke ni devas perdi tiom da tempo kun tiel malgrandaj rezultoj. Tiel ekĝermis en mia menso iom nebula ideo, ke estus eble simpligi la latinan kaj fari ĝin komuna lingvo por ĉiuj popoloj, tiel ke oni devus lerni nur ĝin, krom la gepatra. Tiun ideon mi plurfoje priparolis kun mia tiama kolego kaj plej bona amiko. Post kelkaj monatoj li atentigis min, ke la problemo jam estas solvita per Esperanto. Estis tiam la unua fojo, ke mi entute aŭdis pri la ekzisto de la Internacia Lingvo. Ni aliĝis al kurso. La instruanto estis tiel malbona kaj la kursanoj tiel neinteresaj, ke mi partoprenis nur du lecionojn. Li, mia amiko, restis ĝis la fino kaj fariĝis bona esperantisto. La ideo, tamen, ne forlasis min kaj, fariĝinte studento en 1928 mi eklernis la lingvon. Ni fondis la Akademian Esperanto-Klubon, kiu post kelkaj jaroj fariĝis la centro la tuta Esperanto-Movado en Jugoslavio. Fakte, do, mi ellernis Esperanton pro la malŝato al lernado de lingvoj. Tamen, malgraŭ tiu malŝato, la cirkonstancoj de la vivo devigis min ellerni plurajn lingvojn, tiel ke hodiaŭ mi povas paroli 7 lingvojn kaj kompreni skribitajn tekstojn en 7 pliaj.



Dum prelegvojaĝo en 1950

Esperanto donis al mi multajn praktikajn servojn. Post kiam mi fariĝis rifuĝinto en 1949, mi certe pli multe parolis en Esperanto ol ĉiujn aliajn lingvojn kune, kun escepto de mia nacia. Sed multe super tiu praktika servo staras la intelekta-morala kontribuo de Esperanto por mia formiĝo kiel homo : ĝi ebligis al mi rigardi la homaron tutece, senti min kiel apartenanton al ĝi, aprezi la homon kaj ĉiujn valorojn ne laŭ la raso, nacieco, religio aŭ lingvo, sed el la vidpunkto de la efektivaj kvalitoj. Certe, mi ĝisvivis ankaŭ personajn seniluziigojn, sed tiujn mi ĉiam atribuis kaj atribuas al la malbona karaktero de tiu aŭ alia individuo, kio neniel ombrigas la noblecon de la ideoj kaj idealoj, ligitaj al Esperanto.

La tuta evoluo de la ekonomiaj fortoj, paralele kun la progresoj de la scienco ne nur ebligas, sed vere puŝas la homojn en daŭre multobligantajn internaciajn rilatojn. La homaro troviĝas survoje al ĉiam pli alta integriĝo. Mi estas konvinkita, ke tiu integriĝo povas okazi sen plua sangado, sen superregado de unuj kaj samtempa subigado de la aliaj, nur surbaze de egaleco kaj justeco. Unu el la ĉefaj, eble la plej grava elemento de tia integriĝo estas Esperanto kiel lingva esprimo de egalrajteco. La evoluo laboras por Esperanto. La esperantistoj, kiuj korekte komprenas tiun evolutendencon, per sia laboro konforme al la leĝoj regantaj ĝin, progresigas la evoluon kaj per tio ankaŭ la Internacian Lingvon.



La Universala Ekspozicio, kreaĵo de CED. En la ekspoziciejo en Montevideo : maldekstre de Prof. Lapenna Prof. J. Thomas kaj S-ro L. Elvin, ambaŭ direktoroj de UNESKO.

William Auld :

PENSOJ POST MONTEVIDEO

Lin armas fera fido, integro kaj kuraĝo,
kaj lian citadelon ne breĉas malespero :
kiam plej malfavore grimacas sortvizaĝo,
tiam li plej obstine ne cedas pri l' konkero.

Ho, Esperanto, lingvo de la homar' futura,
kiel li vin servadas, kun kia amo pura !

Malican trivialon de ruzaj Blinkenbergoj
li venkas per la ardo de pravo kaj sincero,
kaj draŝas mokemulojn per nudaj vero-vergoj :
lia koler' majestas kvazaŭ de Jupitero !

Al Esperanto, kara revo kaj pli ol revo,
Lapenna sin dediĉis preter la nura devo !

Ni, kiuj Esperanton amas, lin amas kore.
Mirakle li en Montevideo garnizonis;
en ĉi solena horo pripensu ni explore :
ĉu ankaŭ ni ĝis limoj de nia forto donis ?

Samideanoj ! staras li antaŭ ni modele :
lian ekzemplon grandan imitu ni fidele !

Estas Formita la Internacia Organiza Komitato por la Festoj Okaze de la Zamenhof-Jaro

Ĝus estas formita la Internacia Organiza Komitato, kiu respondecos pri la festoj kaj aranĝoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof en 1959. La IOK havos apartan kunsidon dum la U.K. en Mainz mardon, la 5-an de aŭgusto. Tiam ĝi decidis pri la definitiva programo. Tiukaze estos verŝajne alelektitaj pliaj membroj de la IOK kaj nomita ĝia prezidantaro. La IOK konsistas el jenaj personoj :

ARGENTINO :

D-ro Jorge Sato, Buenos Aires.

AŬSTRALIO :

S-ro Ralph Harry, Diplomato, Armadale.

AŬSTRIO :

S-ro Hans Bauer, Direktoro ĉe ĉeflernejo, Eisenstadt.

BELGUJO :

S-ro Maurice Jaumotte, Industriisto, Wilrijk-Antwerpen.

BRAZILIO :

D-ro Erlino Salzano, Ĝenerala Direktoro ĉe Ministerio de sano, São Paulo.

BRITUJO :

Prof. D-ro W. E. Collinson, Lingvisto, Honora Patrono de UEA, Liverpool.

S-ro Harry Holmes, O.B.E., Vicprezidanto de UEA, London.

BULGARUJO :

S-ro Violin Oljanov, Ĵurnalisto. Sofia.

CEJLONO :

Cejlona Sanghana Njanasatta Thero, Budhana Ĉefmonaĥo, Bandarawela.

ĈEĤOSLOVAKIO :

S-ro D-ro Jaromír Jermář. Scienca Laboristo, Praha Strašnice.

ĈINUJO :

S. Hujucz, Peking.

DANLANDO :

D-ro Paul Neergaard, Privatdocento, Sekciestro ĉe ŝtata Plantprotekta Servo, Kopenhago.

FINNLANDO :

S-ro Vilho Setälä, Magistro de Filozofio, Esperantotie 4, Irislahti, Matinkylä.

FRANCUJO :

Int. Generalo Louis Bastien, Paris.

S-ro René Llech-Walter, Membro de la Estraro de UEA, Perpignan.

GERMANUJO :

D-ro W. Herrmann, Juĝisto, Membro de la Estraro de UEA, Lampertheim.

GVATEMALO :

Inĝ. Héctor Sánchez-Latour, Gvatemalo.

HINDUJO :

S-ro L. Sinha, Universitata Lektoro, West Bengal.

S-ro D-ro Rama Hegde, Kuracisto, Bombay.

HUNGARUJO :

S-ro Márton Lajoš, Oficisto, Budapest.

INDONEZIO :

S-ino Rangkajo Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng, Verkistino, Djakarta.

ITALUJO :

Prof. D-ro G. Canuto, Ordinara Profesoro de Jura Medicino en la Universitato de Torino, Prezidanto de UEA, Torino.

D-ro Inĝ. G. Azzi, Ĉefo de la Transporto en la Distrikto de Como, Membro de la Estraro de UEA, Como.

JAPANUJO :

Prof. Hideo Yagi, Okayama.

JUGOSLAVIO :

S-ro Peter Zlatnar, Prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio, Ljubljana.

KANADO :

S-ro David W. M. Jenkins, Toronto.

KONGO BELGA :

S-ro Pierre Paulus, Elisabethville.

MAROKO :

S-ro Charles Thollet, Kenitra (eks. Port-Lyautey).

MEKSIKIO :

Prof. Juan de Oyarzabal, México 19 D.F.

NEDERLANDO :

Inĝ. J. R. G. Isbrucker, Docento en Alta Teknika Lernejo, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, 's-Gravenhage (Den Haag).

NIGERIO :

S-ro Philip Ogwuazor, Helpsekretario en Ministerio, Lagos.

NORVEGUJO :

S-ro John Selbekk, Komercisto, Sekretario de Norvega Esperantista Ligo, Oslo.

NOVZELANDO :

D-ro C. J. Adcock, Doktoro de Filozofio, Wellington.

POLLANDO :

Inĝ. Edmund Fethke, Warszawa.

SOVET-UNIO :

Prof. Eugeno Bokarev, Lingvisto, Moskva.

SUDA AFRIKO :

S-ro E. W. Woodruff, Johannesburg.

SVEDUJO :

S-ro Jan Strönne, Revizoro de la Nacia Banko, Malmö.

SVISLANDO :

S-ro Hans Kursteiner, Honora Prezidanto de UEA, St. Gallen.
 Prof. D-ro E. Privat, Profesoro de la anglaj lingvo kaj literaturo en la Universitato de Neuchâtel, Hon. Prezidanto de UEA, Neuchâtel.

TURKUJO :

S-ro Hasan Kocaman, Termezuristo, Kadiköy-Istanbul.

URUGVAJO :

Prof. Manuel Fernández Menéndez, Emerita Profesoro, Montevideo.

USONO :

S-ro John L. Lewine, Oficiala Reprezentanto kaj Observanto ĉe UN en ECOSOC, Prezi-

danto de Esperanto-Societo de New York.
 Reprezentantoj de :

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA :

S-ro H. A. de Hoog, Prezidanto de KELI, Amsterdam, Nederlando.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA :

S-ro Alfons Beckers, Paroĥestro, Kwaadmechelen, Belgujo.

VETERANOJ-ESPERANTISTOJ :

S-ro Maurice Lewin, Dunstable, Britujo.

PROVIZORA SEKRETARIO :

Prof. D-ro Ivo Lapenna, "Fellow" ĉe "The London School of Economics and Political Science", de la Londona Universitato, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

Unua Listo de la Membroj de la Internacia Patrona Komitato

La aranĝoj en 1959, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, estas organizataj de la IOK sub la aŭspicioj de Internacia Patrona Komitato, en kiun eniros elstaraj personoj de diversaj landoj. Jam akceptis la inviton fariĝi membroj de la IPK jenaj personoj :

POLLANDO :

S-ro Józef Cyrankiewicz, Ĉefministro.

NEDERLANDO :

S-ro D-ro W. Drees, Ĉefministro.

FINNLANDO :

S-ro Reino Oittinen, estinta Ministro de Instruado, nun Ĉefdirektoro de la Instrua Administracio;

S-ino Tyyne Leivo-Larsson, Ministro, Direktoro de la Socia Muzeo en Helsinko;

S-ro Martti Hela, Doktoro pri Filozofio, Profesoro, Rektoro de la Pedagogia Altlernejo en Helsinko (1947-1957), emerita;

S-ro Wäinö Aaltonen, Profesoro, Skulptisto, Membro de la Akademio de Finnlando;

S-ro Yrjö Väisälä, Fil.Dr., Profesoro de Fiziko, Estro de la Astronomia Observejo en la Universitato de Turku;

S-ro F. E. Sillanpää, Nobelpremiito por literaturo 1939, Hon. Dr. de la Universitato en Helsinko, Verkisto;

S-ro Kalle Väisälä, Fil. Dr., Profesoro de Matematiko, Membro de la Finna Scienca Akademio.

SVEDUJO :

S-ro R. Edenman, Ministro pri Kulturaj kaj Edukaj Aferoj;

S-ro E. Norinder, Konsilanto pri Edukaj Aferoj.

KANADO :

S-ro Camille E. Pouliot, M. D. Ministro de Ĉasado kaj Fiŝkaptado (Provinco de Québec);
 S-ro Marius Barbeau, D. Litt., F.R.S.C., Direktoro de la Nacia Muzeo de Kanado, Ottawa;
 S-ro Frank G. Hanson, Redaktoro de "The Commonwealth";

S-ro Herbert A. Mowat, Publicisto.

KONGO BELGA :

S-ro Jean Paelinck, Guberniestro de Katanga;
 S-ro Jean Hiernaux, Rektoro de la Universitato de Kongo Belga kaj Ruanda-Urundi;

S-ro Amand Van Roy, Prefekto de la Reĝa Ateneo en Elisabethville;

S-ro Emile Delaruelle, Urbestro de Elisabethville.

Oni kalkulas, ke ĝis la fino de tiu ĉi jaro estos kompletigita ankaŭ la IPK kaj ke ĝi konsistos el proksimume 200 membroj el ĉiuj partoj de la mondo.

DISPONIGU LA RIMEDOJN POR
 REALIGI ĈIUJN PLANOJN!

GRAVA INFORMO

Tiu ĉi numero de la revuo aperas eksterordinare malfrue kaj ĝi ne enhavas ĉiujn kutimajn rubrikojn. La kaŭzo estas subita grava malsaniĝo de nia redaktoro, S-ro W. Auld. La tuta materialo por la gazeto troviĝis ĉe li, sed li ne povis prilabori ĝin. Fine, por ke tamen aperu la gazeto, ni preparis ĝin en la Centra Oficejo per materialo kiun ni povis havigi al ni. Ni apelacias al la bonvolo de niaj legantoj kaj esprimas niajn plej varmajn bondezirojn por baldaŭa plena resaniĝo al S-ro Auld, tiel ke jam la venontan numeron li povu ree redakti mem.

La direktorino de la C.O.

Progreso kaj Mankoj de nia Informado

En tiu ĉi numero estas publikigita la Tabela Trarigardo pri la Informa Laboro en la jaro 1957. La sekaj ciferoj, ĉiam relativaj, montras tamen, ke ĝenerale estas farita plia progreso sur la kampo de informado kaj ke, sekve, la interesiĝo pri Esperanto plue kreskis. Aliflanke, ne nur kelkaj eroj montras regreson, sed ankaŭ en kelkaj rilatoj nia informado manifestas mankojn, kelkfoje eĉ erarojn. En la sekvantaj linioj estas plej koncize analizita la nuna stato en tiu ĉi grava sfero kaj donitaj kelkaj sugestoj por plibonigo de la laboro.

Komentoj pri la tabelo

Antaŭ ĉio estas utile fari kelkajn rimarkojn pri la unuopaj eroj de la tabela trarigardo. Ĝi estas kompilita de la Informa Fakto de U.E.A. surbaze de respondoj, ricevita de la landaj kunlaborantoj, al speciala demandaro. Kelkaj landaj informaj faktoj povas doni absolute precizajn informojn, ĉar ili estas bone organizitaj, havas plenan trarigardon pri la farata laboro sur la koncerna teritorio, gvidas la informadon kaj kontrolas ĝian efikon. La aliaj ciferoj estas proksimumaj, sed tamen, laŭ la opinio de la respondintoj, realecaj.

Malgraŭ la insistaj petoj kaj plurfojaj urĝigoj fare de la I.F. de U.E.A., pluraj landaj kunlaborantoj aŭ landaj asocioj ne nur ne respondis al la demandaro, sed eĉ ne pravigis tiun sian neglektadon de tiel grava peto. Ne donis vivosignon la ĉeĥoslovaka, greka, islanda, maroka, pollanda kaj venezuela kunlaborantoj aŭ landaj asocioj. Niaj ĉeĥoslovakaj kunlaborantoj povas esti senkulpiĝitaj, ĉar ili renkontas efektive grandajn malfacilaĵojn en sia laboro. Sed tio tute certe ne validas por la aliaj, precipe ne por la pollanda asocio, kiu estas bone organizita kaj havas plurajn oficistojn. Pro tiu neglektado de elementaj devoj, kiujn altrudas la fundamentaj principoj de internacia kunlaborado, la statistika trarigardo ne estas kompleta.

Pluraj landaj asocioj ankoraŭ ne formis specialan informan fakon — ekzemple la aŭstria, hispana, japana — kaj tial la rezultoj ne povas esti tre kontentigaj. Nur organizita, serioze studita laboro rilate informadon, povas doni efektivan sukceson.

Kelkaj precizigoj pri la unuopaj kolumnoj helpas ricevi pli kompletan bildon pri la signifo de la tabelo:

Artikoloj: Estas enkalkulitaj ĉiuj artikoloj, kiuj pritraktis Esperanton. El ili nur tre sensignifa nombro estis malfavora al la Internacia Lingvo. Ekzemple en Argentino el 80 artikoloj unu estis malfavora, en Brazilo el 3.500 nur 10 estis malfavoraj. En Italujo maksimume 5% estis malfavoraj. En multaj landoj tute ne aperis malfavoraj artikoloj. Sed eĉ en la kazoj de malfavoraj artikoloj,

bona informa fakto, kiel ekzemple la itala, taŭge reagis kaj tiel atingas ankoraŭ pli bonan rezulton. Publika polemiko pri Esperanto povas esti nur utila por la afero de la Internacia Lingvo, se, kompreneble, la informa fakto de la koncerna lando tuj reagis en konvena formo. Oni rimarkos, ke preskaŭ duono de ĉiuj artikoloj kaj informoj aperis en unu sola lando: Brazilo. Kio estas ebla en Brazilo, estas ebla ankaŭ en la granda plimulto de la aliaj landoj.

Prelegoj: Temas pri nacilingvaj prelegoj koncerne Esperanton. Kvankam la nombro estas proksimume sama kiel en la pasinta jaro, tamen tio tute ne sufiĉas. Eĉ ne mil prelegoj en 29 landoj estas vere preskaŭ nenio. La prelegoj prezentas tre utilan metodon precipe tial, ĉar la preleganto povas doni kompletigajn informojn al ĉiuj, kiuj petas ilin. Ĉiujare devus okazi miloj da prelegoj, precipe en universitatoj, lernejoj, sindikatoj, kulturaj societoj k.t.p. Se nur ĉiu instruisto-esperantisto farus sole unu fojon en la jaro prelegon en sia lernejo — kaj se li raportus pri ĝi al sia landa informa fakto — la rezultoj certe estus multe pli bonaj.

Radio-prelegoj: Estas enkalkulitaj nur la prelegoj kaj pli longaj informoj per radio pri Esperanto en la naciaj lingvoj. Kompreneble, ankaŭ la esperantlingvaj elsendoj — 1250 en 1957 — kontribuas al informado, sed ili ne estas enkalkulitaj.

Ekspozicioj: Ankaŭ tiu metodo estas tre malatentata. Bona ekspozicio, eĉ nur malgranda, povas esti treege efika rimedo por plua disvastigo de la lingvo. Menciinda estas la laboro de la Japana Esperanto-Instituto, kiu havis specialan fakon en la kadro de la ekspozicio "Infanoj de la Mondo". Tiun ekspozicion entute vizitis ĉ. 450.000 personoj, kio estas proksimume duono de la nombro de vizitintoj al ĉiuj aliaj Esperanto-ekspozicioj.

Afiŝoj, flugfolioj k.s.: Nur kelkaj landaj asocioj, resp. landaj informaj faktoj, dediĉis taŭgan atenton al tiu formo. Menciinda estas tiurilate la laboro de la brazila, bulgara, germana, itala, jugoslavia kaj sveda landaj asocioj. Ankaŭ tiun metodon de informado oni devus utiligi multe pli vaste.

La laboro de U.E.A.

El la tabelo ne evidentiĝas la laboro, kiun faras U.E.A. sur la kampo de informado. La I.F. de U.E.A. ankaŭ dum 1957 harmoniigis la tutan agadon tra la mondo, donis instigojn kaj konsilojn, liveris materialojn. La I.F. de U.E.A. havas 93 rektajn kunlaborantojn en 32 landoj. La bulteno de la IGS aperigis ĝis nun 242 informojn, kiuj estis tradukitaj en multajn naciajn lingvojn kaj publikigitaj en miloj da gazetoj. Speciala bulteno en la franca kaj angla lingvoj estas sendata al la gazetoj kaj revuoj en landoj sen organizita Esperanto-

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1957

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fakoj	Nombro de		Prelegoj		Radio- pre- legoj	Ekspozicioj		Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la interesiĝo pri Esp. kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	Nom- bro	Ĉees- tintoj		Nom- bro	Vizi- tintoj		
Argentina	Karlo Bongiovanni, La Cigno, Kordobo	80	250	15	600	12	4	3.000	7.000	Kreskegis
Aŭstria	A.E.F. Fünfhausgasse, Wien XV	70	150	5	150	3	5	600	2.600	Iom kreskis
Belga	RBLE, 44, De Bruynlaan Wilrijk-Antwerpen	284	200	1	25	35	1	100	300	Kreskis
Belga Kongo	Esperanto-Office, 18, Rue de Franquennes, Ottignies (Brabant), Belgujo	4	10	—	—	—	—	—	—	
Brazila	Prof. D-ro Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim 27, Rio de Janeiro, DF	3.500	5.000	110	7.500	1.500	8	40.000	39.000	Kreskis
Brita	BEA, 140 Holland Park Avenue, London W. 11	20	460	114	2.000	5	7	50.000	55.000	Kreskis
Bulgara	BEA, Informa Fakoj, Poŝta kesto 66, Sofia	125	350	108	7.000	68	12	10.000	10.000	Kreskas
Ĉina	P.O. Kesto 77, Peking	10	20	9	1.000	—	—	—	—	Kreskis
Dana	P. C. Lange, Giesegaardsvej 33, København-Valby	100	500	1	100	3	5	300	2.600	Sama
Finna	Pentti Kinosmaa, Heinolankatu 4, A, 25, Helsinki	45	31	1	150	—	2	7.000	500	Stagnas
Franca	André Ribot, 11, rue Paul Vergnes, Marmande (L. & G.)	950	—	31	1.000	180	10	5.000	10.000	Kreskas
Germana	EGS, M. Schumacher, Fehrbellinstr. 5, Köln-Weidenpesch	507	488	70	3.000	16	30	8.000	40.000	Kreskis
Hinda	Informis Lic. T. Sekelj	5	15	5	350	—	—	—	2.000	Kreskis
Hispana	Informis HEF	100	—	20	3.000	260	6	5.000	2.000	Kreskis
Hungara	IF de HEK, Bors-u. 2 Budapest XII	60	124	5	800	12	7	6.000	1.000	Treege kreskis
Itala	Informoficejo de IEF Cas. post. 248, Torino	200	895	124	17.000	85	37	74.000	70.000	Ege kreskis
Japana	Informis JEI, Hongo, Motomati 1-13, Tokio	42	104	3	300	8	19	450.000	5.000	Kreskas
Jugoslavia	IF de JEF, Gornji Trg 31/II, Ljubljana	600	450	60	8.000	140	20	12.000	27.500	Tre kreskis
Kanada	W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave. Toronto 7, Ont.	30	52	4	200	5	3	3.000	600	Kreskis
Meksika	Alicia Zepeda, Altamirano 75-1, México, 4, D.F., México	20	15	7	700	—	—	—	—	Senŝanĝa
Nederlanda	Informa Komitato, Sekr. J. Calado, Vergeetmijnstraat 29b, Rotterdam	260	?	?	105	3	?	2.800	—	Sama

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1957

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fakoj	Nombro de		Prelegoj		Radio- pre- legoj	Ekspozicioj		Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la interesiĝo pri Esp. kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	Nom- bro	Ĉees- tintoj		Nom- bro	Vizi- tintoj		
Nepala	Informis Lic. T. Sekelj	4	10	3	—	—	—	—	—	Kreskis
Norvega	IF de NEL, L. Anjer, Oberst Rodesvei 76, Oslo-Nordstrand- høgda	70	730	9	200	4	—	—	2.000	Iom kreskis
Novzelandia	N.Z.E.A., P.O. Box 3214, Auck- land	22	2	8	500	1	?	?	3.500	kreskis
Sarlanda	I.F., Albert Fehr, Am Schwei- zersberg 28, Klarenthal/Saar	30	10	1	50	2	2	80	4.000	Iom Kreskis
Sveda	SEF, Jan Strönné, Amirals- gatan 36, Malmö	263	557	184	15.000	9	14	280.000	13.000	kreskis
Svislanda	IF, Dr. Arthur Baur, Hang- weg 57, Liebefeld-Bern	51	50	8	?	1	1	?	1.000	Same
Soveta Unio	Informis S. V. Saryčev, Abon. Jaŝčik 1259, Moskva, K-9	344	—	—	—	—	—	—	—	
Urugvaja	I. F. Rubens A. Barbieri, Río Branco 1556, ap. 601, Monte- video	21	50	3	700	15	1	300	2.500	Sama
29 respondoj	ENTUTE	7.817	10.508	909	69.430	2.367	194	957.180	251.000	Kreskis
31 respondoj	Komparaj ciferoj por la jaro 1956	7.178	8.191	925	73.597	1.924	224	249.435	462.970	Tre Kreskis
21 respondoj	Komparaj ciferoj por la jaro 1955	3.293	8.669	621	32.500	857	60	70.200	108.176	Kreskis

Movado. En 1957 aperis 12 numeroj de tiu bulteno, sed ne estis eble kontroli la nombron de informoj, publikigitaj en la naciaj lingvoj. La Kongresa Gazetara Servo faras bonegan laboron. En la pasinta jaro aperis nur en Francujo 358 informoj kaj artikoloj en pli ol 44 milionoj da gazetekzempleroj nur dank' al la KGS. Ne estis eble kalkuli la nombron de informoj en aliaj landoj. Elstaran laboron plenumis la sendito de U.E.A., Lic. T. Sekelj, en Azio, precipe en Hindujo kaj Nepalo. Plue, la 6-lingva flugfolio estis daŭre disdonata al la partoprenantoj de diversaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj. La I.F. de U.E.A. liveris artikolojn por diversaj okazoj kaj havigis prelegmaterialojn por specialaj celoj. Unu artikolo, ekzemple, liverita de la I.F. de U.E.A., aperis en 112 gazetoj kaj revuoj en 16 naciaj lingvoj. Siavice, CED per sia agado en la internaciaj medioj, ĉe gravaj organizaĵoj, institucioj kaj institutoj, konsiderinde kontribuis al korekta informado pri la Internacia Lingvo.

Specialaj metodoj

Pluraj informaj fakoj aplikis pliajn rimedojn kaj metodojn en sia informa laboro. Televidon utiligis

precipe Brazilo kaj Italujo. La samaj du landoj vaste utiligis ankaŭ filmojn ĉu por ilustraj prelegoj, ĉu kiel aldonon. En Bulgarujo kaj Jugoslavio estas en multaj lokoj utiligataj la t.n. "murgazetoj". En tiuj du landoj troviĝas en multaj lokoj specialaj vitrinoj kun esperantaĵoj. Tiuj metodoj montriĝis tre efikaj.

Modela laboro

Pluraj landaj asocioj kaj landaj informaj fakoj meritis apartan mencion pro sia trafa agado. Kelkaj el ili — ekzemple la brazila, germana, jugoslavia, norvega kaj sveda — estas jam konataj pro siaj solideco kaj konstanteco. Ilia laboro evoluis ankaŭ en la pasinta jaro sur la sama alta nivelo.

Sed en la pasinta jaro la Informa Fakoj de la Itala Esperanto-Federacio faris tian progreson, ke ĝia laboro povas esti konsiderata kiel vera modelo. La Informa Fakoj de IEF, organizita antaŭ kelkaj jaroj de s-ro G. C. Fighiera kaj nun gvidata de s-ro R. Pennazio, havas siajn proprajn kunlaborantojn en multaj lokoj de Italujo. Kun tiuj kunlaborantoj okazas de tempo al tempo renkontiĝoj, en kiuj estas traktataj la problemoj de la enlanda informado, analizataj la atingitaj sukcesoj kaj

malsukcesoj, akceptataj decidoj pri plua agado. La I.F. de IEF agas absolute konforme al la principoj starigitaj de la internacia movado kaj adaptas tiujn principojn al la landaj cirkonstancoj. La fundamentoj de informado, akceptitaj en 1956 en Frostavallen, formas la bazajn gvidliniojn por la informado en Italujo. Niaj italaj kunlaborantoj kontrolas ĉion, kio aperas en la itala gazetaro pri Esperanto, kaj tial povas tuj efike respondi per argumentoj kaj pruvoj. Ĉiuj metodoj de informado estas paralele, adekvate kaj proporcie aplikataj: artikoloj, informoj, radio-prelegoj, televidaj intervjuoj, grandaj publikaj ekspozicioj, konstantaj elmontrofenestroj, grandaj afiŝoj, malpli grandaj flugfolioj, prospektoj, plue teatraĵoj, prelegoj kun filmoj, nuraj filmprezentadoj kun mallongaj informoj k.t.p. Diversaj aranĝoj, sugestitaj de U.E.A. en pluraj okazoj — ekzemple okaze de la Tago de la Homaj Rajtoj, aŭ Tago de U.N. — estis vaste organizitaj tra la tuta lando ne nur por la esperantistoj, sed ankaŭ por la neesperantista publiko, kio siavice fortikigis la prestiĝon de la lingvo. Tiaspecaj aranĝoj ebligis plian informadon per artikoloj,

prelegoj, afiŝoj kaj aliaj metodoj. Paralele kun tiu informa laboro oni penetris ĉiam pli en sciencajn mediojn, inter la studentaron kaj junularon ĝenerale. Rezulte formiĝis pluraj novaj grupoj kaj malfermiĝis novaj kursoj. La itala I.F. kaj ĝiaj kunlaborantoj akceptu tutkoran, tre merititan gratulon.

Konkludo

Ekde la momento, kiam tiuj ĉi linioj estos legataj, necesos komenci la preparlaborojn por konsiderinda intensigo de la informado ĉie en la mondo en la jubilea jaro 1959. Malgraŭ la kelkaj mankoj, kiujn oni povas forigi per iom da fortoŝtreĉo, nia informa aparato estas ĝenerale bone organizita, agas celtrafe kaj estas kapabla plenumi la grandan taskon de impona informa laboro en la jaro 1959. La Informa Fakto de U.E.A. faros sian eblon por helpi per sugestoj, konsiloj, materialoj, sed ankaŭ ĉiu landa informa fakto kaj ĉiu unuopa kunlaboranto devas doni siafere la maksimumon, por ke la informado en 1959 estu ne nur kvante multe pli abunda ol ĝi estis en la pasintaj jaroj, sed ankaŭ kvalite ankoraŭ pli bona. I. L.

Reciproka Aprecado de la Okcidenta kaj Orienta Kulturaj Valoroj la Rolo de la Internacia Lingvo

Resumo de la Enkonduka Raporto farota al la Unua Sekcio de la 43-a U.K. en Mainz

1. *Origino kaj celo.* — La Ĝenerala Konferenco de UNESKO akceptis en New Delhi Rezolucion 4.81, per kiu ĝi rekonis, ke la paca kunlaborado inter la popoloj povas esti konstruata nur sur la fundamentoj de plena scio kaj reciproka aprecado de la kulturaj valoroj de la aliaj kaj ke, en la nunaj kondiĉoj, unuarangan signifon havas precize la reciproka aprecado de la Orienta kaj Okcidenta kulturaj valoroj. Tial la Konferenco akceptis t.n. grandan projekton sub la titolo "Reciproka Aprecado de la Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj" kun la celo intensigi per diversaj metodoj kaj laŭ pluraj vojoj la pli bonan reciprokecon de ĉio kreita sur kultura kampo en Oriento kaj en Okcidento. Tiu ĉi granda projekto estos realigata dum 10 jaroj ekde la 1-a de januaro 1957. La Ĝenerala Konferenco invitis ĉiujn ŝtatojn-membrojn, la Plenuman Komitaton de UNESKO, la Ĝeneralan Direktoron kaj la kunlaborantajn organizaĵojn partopreni en la realigo de la projekto. UEA, kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESKO, akceptis la inviton, des pli ke la realigo de tiu granda projekto estas plene konforma al la celoj de UEA kaj al la idealoj de la Esperanto-Movado.

II. *La Problemo.* — Kiam la Ĝenerala Konferenco (Ĝ.K.) de UNESKO en Montevideo atentigis pri la problemoj kaj la Ĝ.K. en New Delhi decidis doni al ĝi la rangon de granda projekto, ĝi nur rekonis jam konatan fakton: ke la kulturaj valoroj de aliaj popoloj estas tre malmulte konataj kaj

ke tio malhelpas, eĉ kelkrilate malebligas interkompreniĝon. La emfazo estas metita sur la mankon de reciprokaj konoj en Oriento kaj Okcidento, sed tiuj du vortoj estas relativaj. Nek el geografia, nek el kultura vidpunkto estas eble fari netan distigon inter la t.n. "okcidentaj" kaj "orientaj" popoloj. Tion oni devas bone memori, kiam oni parolas pri la kulturaj valoroj de Okcidento kaj de Oriento. En ĉiu okazo la diferencoj ne estas rezulto de malsameco de la pensmaniero, aŭ de la moralaj aŭ spiritalaj idealoj, ankoraŭ malpli de rasaj malsamecoj, sed ekskluzive de historiaj faktoroj. Plue — kaj tion la Ĝ.K. de UNESKO malatentis — nekono de la kulturaj valoroj ne rilatas nur al tio, kion oni kondiĉe kaj kun rezervoj povas nomi Oriento kaj Okcidento, sed ankaŭ al kulturaj valoroj de multaj aliaj komunaj en la kadro ĉu de "Okcidento" ĉu de "Oriento". Tre verŝajne, ekzemple, la kulturaj valoroj de Japanujo estas same malmulte konataj en iu okcidenteŭropa lando, kiel tiuj de Bulgarujo. Kaj inverse. Kun tiuj rezervoj estas tamen eble konstati, ke la kultura disvastiĝo pli fluis el Okcidento al Oriento — precipe koncerna scienca kaj teknika scio — ol de Oriento al Okcidento. El tio sekvas, ke Oriento estas malpli konata en la Okcidento, ol estas la Okcidento en la Oriento. Plua sekvo estas, ke ankaŭ en Oriento — ĝuste pro la limigo de la kultura disvastiĝo ĉefe al la scienca kaj teknika aspekto — la ideo pri la Okcidenta kulturo kiel tuto estas forte deformita. Fine — kaj tion denove

UNESKO pretervidas — en Oriento, ĝenerale parolante, la tuta t.n. Okcidento estas reprezentita tra la kulturoj de du-tri grandaj nacioj, sed ne tra la kulturaj valoroj kreitaj de malpli grandaj, precipe orienteŭropaj nacioj.

La granda projekto de UNESKO celas solvi tiun tutan problemaron kaj kontribui al diskonigo de la kulturaj valoroj de la Okcidento en Oriento kaj de la Oriento en Okcidento per: kunlaborado de specialistoj en la sferoj de sciencoj kaj artoj, tradukoj de elstaraj verkoj, ekspozicioj, instruado en lernejoj kaj universitatoj k.s. La grandeco de la projekto postulas, ke en ĝi aktive kunlaboru la Sekretariato de UNESKO, la Naciaj UNESKO-Komisionoj, la universitatoj kaj lernejoj, la sciencaj kaj artaj institucioj, ĉiuj privataj organizaĵoj, kiuj celas interkompreniĝon de la popoloj. La tuta laboro devas esti farata absolute senpartie, objekte kaj sen antaŭjuĝoj. La Sekretariato de UNESKO harmoniigos kaj kolektos ĉiujn kontribuojn sur tiu ĉi kampo, daŭre komunikados la atingitajn rezultojn, instigados al pliaj aktivecoj.

III. *Rolo de la I.L.* — Nenie en la dokumentaro de UNESKO pri tiu ĉi problemato estas menciita la lingvo kiel obstaklo al diskonigo de la kulturaj valoroj, kvankam sendube la diverseco de lingvoj prezentas la ĉefan obstaklon. UNESKO planas tradukojn de gravaj verkoj — la plano jam realiĝas — en kelkajn lingvojn de la Okcidento kaj de la Oriento. Tamen, denove temas pri tradukoj ĉefe al la angla kaj franca, kio ankoraŭ pliriĝos la

kulturajn valorojn en tiuj lingvoj, sed kio neniel helpas la malgrandajn lingvojn, nek la disvastigon de la tradukitaj verkoj ekster la medioj, kiuj scias la koncernajn lingvojn. Estas do necese atentigi pri la rolo de la Internacia Lingvo en la realigo de tiu granda projekto kaj ĝenerale en la diskonigo de la kulturaj valoroj. Tiucele la sekcio devos pritrakti jenajn punktojn:

A/ *Kulturaj valoroj en Esperanto*: (1) Universaleco de la traduka beletra literaturo, (2) universaleco de la originala beletra literaturo, (3) traduka kaj originala scienca literaturo, (4) kulturaj, filozofiaj kaj religiaj revuoj, (5) radio-elsendoj, (6) belartaj konkursoj, (7) Internacia Somera Universitato, (8) internaciaj konferencoj kaj seminarioj, (9) interŝanĝoj de prelegoj, artikoloj kaj personoj, (10) internacia korespondado, (11) diversaj aliaj aspektoj.

B/ *Esperanto kiel pontolingvo*: (1) Tradukoj el la Internacia Lingvo al la naciaj, (2) Esperanto kiel traduklingvo de la internaciaj kongresoj kaj konferencoj, (3) aliaj aspektoj.

IV. *Konkludo.* — La Sekcio resumas la rezultojn de sia laboro en formo de rezolucio, kiu (1) koncize prezentos la ĝis nun atingitajn rezultojn por la interkonigo de la Okcidenta kaj Orienta Kulturaj Valoroj per la I.L., (2) skizos la gvidliniojn por intensigo de la laboro sur tiu ĉi kampo en la sekvantaj 8 jaroj, (3) atentigos la Sekretariaton de UNESKO kaj ĉiujn instancojn efektivigantajn tiun ĉi grandan projekton pri la signifo de la Internacia Lingvo.

La muzikisto-poeto de la Kongreslando

Beethoven kaj la samtempuloj

de Adolphe Boschot de la Franca Instituto

Oni scias nun, ke liaj infanaj kaj knabaj jaroj estis malpli malfeliĉaj ol montris tro facila romantismo. Tuj post la dudeka jaro, en Vieno, li fariĝis laŭmoda artisto. En la alta societo il trovis fidelajn protektantojn. Oni elektadis lin kiel virtuozon de fortepiano, kiel improviziston kaj ankaŭ kiel kvazaŭ teruran infanon, al kiu oni pardonas amuzajn strangaĵojn. Sendube oni ne plene divenis lian genion de komponisto. Tamen, tiu juna muzikisto vivis sendependa; la mono alvenadis kun facileco, dank'al lecionoj, koncertoj kaj dediĉaĵoj. Eĉ pli: li trovis eldonistojn por sia muziko. Kaj li vendadis ĝin je konvena prezo.

Malbonŝance, ek de la dudekvina jaro li suferis pro aŭdaj ĝenoj. Unuaj simptomoj de surdeco baldaŭ grandiĝanta. La malsano, eĉ pli angora por muzikisto, komencas izoligi lin de la aliaj homoj. Kiam li plu ne komprenas

iliajn parolojn, li ŝajnigas sin distrita, laborplena; kaj li serĉas la solecon por vivi kun sia malgajo. Tiam, tute sola kun siaj pensoj, jen en la naturo jen en la ideala kunestado kun la amataj geniuloj, li elkovradis la mirindan mondon de sia koro, kie kantadis lia muziko.

Kiel kondutadis tia homo inter siaj samtempuloj kaj kiel ili juĝadis lin? Kelkaj el la atestantoj, kiuj postlasis notojn pri li, havas famajn nomojn, aliaj nomojn du aŭ triarangajn kaj aliaj estus tute forgesitaj se ili ne estus havintaj la ŝancon alproksimiĝi al li kaj verki kelkajn liniojn, kiuj koncernas lin. Kurioza fakto: estas ĝenerale la nekonatuloj, kiuj alportas la plej bonajn priskribojn pri Beethoven.

Goethe, la plej fama el la samtempuloj, pasis apud li sen klopodi lin kompreni aŭ, pli precize, sen dediĉi al li grandan atenton. Kiam ili renkontiĝas, en 1812, Goethe estas sesdektri jara kaj Beethoven kvardekdu. Krom tiu aĝodiferenco, iliaj aspiroj estas diverĝaj. La poeto, resaniĝinta de romantismo, kiu ŝajnis al li obskura, celas al harmonia pensado, eble senpasia, sed parenca al greka panteismo kaj ĉefe al tiu de Heraklito: ĉio preterpasas, sed ekzistas konstantaj leĝoj en la universo. Goethe, lerta, elturnema, laŭmoda aŭtoro kaj

direktoro de teatro, kortegano kaj ministro, aspiras al la krono de Olimpiano de Weimar; sed, spite de sia monduma famo, spite de sia alta spirito, tiu filo de Frankfurta burĝulo estas imponita de la titolplenaj superuloj de malgranda ĉefurbo.

Kia kontrasto kun Beethoven!... En 1812, en Teplitz en Bohemujo, ambaŭ promenas. Ili renkontas kelkajn eminentulojn de la Imperiestra Kortego. Tuj Goethe cedas la vojon, ceremonie salutas kaj gratulas ilin.... Beethoven, preskaŭ sen levi sian ĉapelon, paŝas meze de ili. Oni tute ne atentis tion. Oni scias, ke li estas surda kaj ke lia surdeco izoligas lin, igas lin sovaĝa.... Goethe skribas, ne senprava:

"Li estas nevenkebla.... Mi neniam vidis artiston pli koncentrita, pli energia, pli sentema. Mi komprenas tre bone ĝis kiu grado li devas ŝajni al la mondo miriga.... Li estas, cetere, tre pardoninda kaj bedaŭrinda, ĉar li surdiĝas...."

Koncerne lian muzikon, ĝi "mirigas" Goethe. Sed, malgraŭ siaj artismaj sentoj kaj sia muzika ŝato, li ne havos okazon en Weimar aŭskulti liajn verkojn kaj ĉefe liajn plej vastajn komponaĵojn. Baldaŭ li forgesos lin. En 1823, kiam Beethoven skribos al Goethe por ricevi de la Grandduko de Weimar helpon de kvindek florenoj

por la eldonado de la **Solena Meso**, la olímpia poeto (kaj ministro) eĉ ne donos al si la zorgon respondi.

Rossini vizitis Beethoven en 1822. Kion ili povis diri al si? La sukceso de la **Barbiere** pligrandigis la distancon, la abismon kiu dividis la tiaman Beethoven de la viena publiko. Oni facile komprenas, ke la verkinto de la lastaj **quatuor** nur kun peno povis reteni sin.

Kun Weber, en 1824, la konversacio estis malpli longa, sed ĝena. Kvardek jarojn poste, la filo de Weber raportos pri ĝi; aliaj dokumentoj pruvas, ke ĝi certe ne estis tre amika: Beethoven sentis la originalecon de Weber; sed li mem pasie aspiris al io alia.

Rilate al la impresoj de Schubert, kiom estas bedaŭrinde, ke oni havas ilin nur triamane! La granda kaj intuiciema Schubert amis la genion de Beethoven kaj komprenis lin profunde. Eĉ pli, li, tiel dolĉa koro, timis la senmezuran Titanon. En Vieno ili estis najbaroj; sed inter ili, en la ĉiutaga vivo, preskaŭ neniu rilato. Tamen, kiom oni amas tiujn ĉi liniojn, verkitajn de samtempulo post interparolado kun Schubert:

"Oni komencas kompreni Mozart; sed neniu ĝis nun bone komprenas Beethoven; por tio oni devas havi multan inteligentecon kaj pli da koro. Oni ankaŭ devas esti koninta la mal-feliĉon".

Kaj la amiko de Schubert aldonas: "Schubert esprimis sin ĉiam per tiuj seriozeco, bona senco kaj akuteco".

Escepte de Schubert, "pura koro", la samtempaj muzikistoj, ĉefe la famaj, neniel komprenis Beethoven. Iam pianisto kaj improvizisto dorlotita en la salonoj — nun li turnis la dorso al la mondumaj sukcesoj. Ju pli li atingadis la muzikajn pintojn, des pli li fariĝadis la neon de la modoj en Vieno. Malgraŭ ĉio, oni respektis la nevenkeblan forton, kiu vivis en li. Nekonata, misterplena, ĝi jam direktis al la estonto sian kreskantan regadon.

Por ĉiuj, li spiris en alia mondo. Li vivis, abrupta, super la aliaj homoj. La buboj, foje, sekvis lin en la stratoj kaj nomis lin **der Narr**, la frenezulo! Ĉar li marŝis grumblante, kantante, frapante la takton, senĉapela ofte sub la pluvo, la haroj kiel virga kreskaĵaro, la vizaĝo ruĝa, la okuloj minacantaj, dum la sennoda kravato frapis sur la dubkolora redingoto.... Li haltis: skribaĉis sur poŝkajeron.... Kaj li malaperis, longpaŝante, kvazaŭ demono....

Al la vizitantoj, kiuj ĝuis lian konfidon, li parolis pri Homero, Shakespeare, pri la herooj de Plutarĥo, pri **Faust** de Goethe; kaj ankaŭ, kun admiro, pri Bach, Mozart, Haydn kaj pri la giganta Händel....

Jes, lia animo loĝis aliloke.

Kaj kiaj belegaj konfidencoj, fojfoje, li alportis el tiu ideala mondo, kiam antaŭ sia fortepiano, li improvizis por si mem aŭ por unu aŭ du amikoj!

Jam oni adoris lin. Jam kelkaj sam-

tempuloj, inter la nekonatoj la humiluloj, kies koro estis lumigita de la entuziasmo kaj de la ama diveno, alproksimiĝis al li kiel al mirakla

homo, superhomeca, transfigurita de supernatura flamo.

(El "**Musiciens poètes**", **Plon eldonisto, Parizo. Tradukis G.C.F.**)

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	9.00-930	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3 ^o -Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 39.11 m, 30.93m, P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
Lundo	00 45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m, P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 298m. (1007 kcs) P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. (D-ro Baur).
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m. (917 kcs), 221m. (1357 kcs). K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	16.40-16.50	Wien. 208m. (1440 kcs), 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.10-17.30	Stockholm, 32.30m., 26.50m., 20.20m., K. Radio I.B.R.A., Poŝtfako 821, Stockholm I, Svedujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	19.00-19.15	Stockholm, 32.30m., 26.20m., 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.50-23.00	Hilversum, 402m. (746 kcs), I, V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat.)
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	21.45-21.57	Vich, 193m. K. Radio Vich (Barcelona), Hispanujo.
	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m., 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. K. Radio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 298m. (1007 kcs), P. K.R.O., Emmastraat 52, Nederlando.

Radio Roma. 1-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 4-VII, Italujo kaj verkisto Wilhelm von Humboldt; 8-VII, Itala regiono Emilio; 11-VII, Leterkesto kaj bibliografio; 15-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-VII, Novaĵoj el Italujo; 22-VII, Tra Romo; 25-VII, Ekskursoj de la 29-a Itala Esp-Kongreso; 29-VII; Lirika kantistino Adelina Patti; krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

Radio Zagreb. 3-VII, La 50-jara jubileo de Esp. movado en Jugoslavio; 10 kaj 17-VII, Pri la 17-a Jugoslavia Kongreso en Novi Sad; 24-VII, Pri la popola respubliko Kroatujo; 31-VII, Novaĵoj kaj respondoj al korespondantoj; 7-VIII, Dubrovnik, la urbo de la festludoj; 14 kaj 21-VIII, Pri la Universala Kongreso en Mainz; 28-VIII, Novaĵoj kaj respondoj al korespondantoj.

NEKROLOGO

Oskar Bünemann. Atingis nin la malĝojiga informo ke forpasis antaŭ nelonge en alta aĝo konata meritplena esperantisto Oskar Bünemann, Honora kaj Dumviva membro de U.E.A. Ni direktas nian sinceran kondolencon al la parencoj.

43-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

2-9 Aŭgusto 1958

Mainz-Germanujo

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 9 Junio 1958

Abonantoj :

La Loka Kongresa Komitato decidis, ke tiuj esperantistoj, kiuj ne povos persone ĉeesti la Universalan Kongreson, tamen povos aliĝi al ĝi kiel "abonantoj" kontraŭ pago de abonanta kotizo de 8 g.m. La abonantoj ne rajtos partopreni en la Kongresaj aranĝoj, sed ricevos la kongresajn dokumentojn, inkluzive de Dua Bulteno, Kongresa Libro kaj insigno.

Komunikoj :

La nuna estas la lasta monata Komuniko de la Kongreso.

Statistiko :

(ĝis fino de majo) Aŭstralio 1, Alĝerio 2, Aŭstrujo 26, Belgujo 26, Brazilo 6, Britujo 153, Bulgarujo 11, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 94, Etiopio 1, Finnlando 16, Francujo 318, Germanujo 550, Grekujo 2, Hispanujo 19, Hungarujo 6, Islando 8, Israelo 1, Italujo 99, Japanujo 2, Jugoslavio 60, Maroko 7, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 116, Norvegujo 37, Novzelando 5, Pollando 9, Portugalujo 2, Sovetunio 2, Sudafriko 1, Svedujo 135, Svisujo 40, Urugvajo 1, Usono 11, Venezuelo 2. Entute 1774 el 36 landoj. (Pasintjare 1103 el 35 landoj).

La Loka Kongresa Komitato memorigas al ĉiu partoprenonto la oportunecon kunporti taŭgajn vestojn por la oficialaj kaj solenaj aranĝoj de la Universal Kongreso kaj deziras al ĉiuj bonan vojaĝon kaj agrablan restadon en Mainz la Ora.

G. C. Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

PRECIZIGO PRI LA K.G.S.

En la aprila numero de "Esperanto", sur la p. 62, estas dirite, ke dum la U.K. en Parizo, en la jaro 1950, estis la unuan fojon organizita la Kongresa Gazetara Servo. "Svisa Espero" at-

tigas, ke dum la U.K., kiuj okazis en Svislando en la jaroj 1947 kaj 1939 (Bern), funkciis ellaboritaj gazetservoj. Aliflanke, gesinjoroj Laurie el Bournemouth sciigis, ke okaze de la U.K. en tiu urbo, en la jaro 1949, aperis pluraj informoj en la gazetaro.

Mi volonte komunikas tiujn ĝustigojn, sed precizigas, ke, kompreneble, ekde la Unua U.K. en Bulonjo-sur-Mar la gazetaro ĉiam dediĉis pli aŭ malpli grandan atenton al U.K. kaj sporade la lokaj organizantoj eĉ organizis sukcesajn gazetarajn servojn, kelkfoje eĉ gazetarajn konferencojn. Tamen, nur ekde la Pariza Kongreso la Kongresa Gazetara Servo fariĝis konstanta kaj konsista parto de niaj U.K. kiel organizita branĉo de la Informa Fakto de U.E.A. Tiel organizita, ĝi rapide evoluis kaj nuntempe ne nur eldonas ĉiutagan bultenon kaj liveras artikolojn, sed ankaŭ organizas grandajn preskonferencojn. Krome, ĝi havas fotoservon kaj radio-televidan servon. Rezulte, en miloj da gazetoj, ne nur lokaj aŭ landaj, sed de la tuta mondo aperas informoj kaj artikoloj pri la U.K., dum la radio, televido kaj kelkfoje eĉ la filmjurnaloj raportas en diversaj formoj.

I. L.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 306

La 1-an de junio 1958.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de majo kaj ankaŭ por komparo je la fino de majo 1957 :

	1957	1958
Asociaj membroj	9691	8835
Individuaj membroj		
MJ	708	650
MA	5052	4391
MS	634	506
Pat.	5	5
DM	301	303
HM	52	46
JMJ	12	11
JMA	85	85
	6849	5997
	16540	14832

DELEGITOJ

Aŭstralio

Perth (Western Australia) D : S-ino Ruth McGrath, dommastrino, 41 Reynolds Road, Mount Pleasant.

Aŭstrujo

Linz (Ober-Osterr.) FD (abelkulturo) : vakas.

Britujo

Burnley (Lancashire) FD (geografio) : S-ro Fred Parker, eksinstruisto, 368 Colne Road.

Danlando

Faaborg (Fyn) FD (industrio) : S-ro Erling Knudsen, kemi-inĝeniero, Oestergade 21.

Klampenborg D : S-ro Eiler Frost, arkitekto, Ved Fortunen 16. FD (vegetarismo) : la D.

Finnlando

Helsinki (Pakila) VD : S-ro Arvo Korpela, Dipl. inĝeniero, Kytöniityntie 39.

FD (tekniko, patentoj) : la VD.

Helsinki (Uusmaa) : FD (blinduloj) : vakas.

Turku FD (ĵurnalismo) : S-ro Niilo Kavenius, redaktoro, Niklaksenkatu 10/14.

Francujo

Ruelle (Charente) D : S-ro Michel Massemin, oficisto, Fissac.

Sèvres (Seine et Oise) D : vakas.

Gvatemalo

Guatemala (C.A.) VD : F-ino Consuelo de Sánchez-Latour, komerca sekretariino, 10a. C. Pasaje Coloma 4 zona 1.

Hungarujo

Budapest (Lörinc) VD : S-ro István Gulyás, pensionulo, XVIII, Kosztolánji D-u. 060.

Italujo

Catania D : vakas.

Roma FD (katolikismo) : vakas.

Jugoslavio

Konjščina (Hrvatska) D : S-ro Duro Smeh, instruisto, Kroatio. FD (instruado) : la D.

Kenjo

Nairobi D : provizore vakas.

FD (botaniko) : provizore vakas.

Nederlando

Terschelling (Friesland) D : S-ro Roelf J. Kruiter, ludonanto de somerdometoj, Westerdam 7, Midsland.

Norvegujo

Trondheim FD (lingvoj angla, franca, germana) : F-ino Lif Berg, eksinstruistino, Sverdrups Vei.

Novzelando

Christchurch (Canterbury) D : vakas.

Wellington FD (universitataj aferoj) :
S-ro Cyril John Adock, universitata
docento, Victoria University of Wel-
lington, Box 196.

Pollando

Radom FD (filatelo) : S-ro Adolf
Łuczkiwicz, instruisto, ul. Wspólna 7
m 4.

Rzeszów VD : S-ro Józep Kucharz,
emerito, Bernardynska 6.
FD (filatelo) : la VD.

Sovetunio

Erevan (Armenio) D : S-ro Gurgen
vela lingvoj) : la D.

FD (lingvoscienco, armena kaj kart-
Sevak, lingvisto, Poŝt-kesto 78.

Leningrad : D : S-ro S. N. Podkaminer,
sciencisto, Petropavlovskaja 4, uv.
34.

FD (pedagogia kaj scienca kine-
matografio) : S-ro Boris Toll, scielo-
laboru, pedagogo, Lesnoj pr. 20
kv. 98.

Odessa D : S-ro Alekseo I. Verŝinin,
inĝeniero ŝip-mekanisto, Poŝt-kesto
256.

Svedujo

Hälsingborg (Skåne) D : vakas.

Arvidsjaur (Lappland) FD (hotelo) :
vakas.

Svislando

Chez-le-Bart (Neuchâtel) D : S-ro
Edovard Waldvogel, protestanta
pastoro.

FD (religio) : la D.

Estavayer-le-Lac (Friburgo) : D: vakas.

Turkujo

Bursa D : S-ro Lâtif Balkanci, horlo-
ĝisto, Atatürk Caddesi No. 57.

VD : S-ro Ahmet ER, kontoristo,
Hürriyet Mahallesi 267.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Zorgdrager, F-ino C., Vlissingen,
Nederlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

663 Raynor, S-ro R. W., Nairobi,
Kenya.

664 Unchitti, S-ro C. L., Bangkok,
Tajlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1958

371 Neves, S-ro Jorge Soares das, Rio
de Janeiro, Brazilo.

372 Oliveira, S-ro Lauro Jorge de, San-
tos, Brazilo.

373 Portugal, D-ro F. J. Soares, Curitiba,
Brazilo.

374 Queiroz, S-ro Manoel Mendes de,
Santos, Brazilo.

375 Rodrigues, S-ro O., Rio Pomba,
Brazilo.

376 Santiago, S-ro P., Maceio, Brazilo.

377 Santos, S-ino Idalina Castro dos,
Curitiba, Brazilo.

378 Santos, S-ro H. Pereira dos, São,
Paulo, Brazilo.

379 Siedlecki, S-ro Kazimiro, Matinhos,
Brazilo.

380 Silva, S-ro Leonidas, Bauru, Brazilo

381 Vaz, S-ro Antonio José, Rio de
Janeiro, Brazilo.

382 Vianna, D-ro João, Belo Horizonte,
Brazilo.

383 Vianna, S-ro Lincoln Martins, Belo
Horizonte, Brazilo.

384 Wutke, D-ro C. A., Uberlândia,
Brazilo.

385 Zamora, S-ro Ary, Porte Alegre,
Brazilo.

386 Bailey, S-ro Eric, Ashford, Britujo.

387 Cochrane, F-ino I. M., Dunferm-
line, Britujo.

388 Ford, F-ino E., London, Britujo.

389 Hilder, S-ro Edward C., Bideford,
Britujo.

390 Hoyle, S-ro James, Manchester,
Britujo.

391 Morton, F-ino H. R., London, Bri-
tujo.

392 Shaw, S-ro Francis W., Crewe,
Britujo.

393 Toms, S-ro C. H., Freshwater,
Britujo.

394 Bideau, S-ro A., Dyon, Francujo.

395 Mas, F-ino M., Montferrand,
Francujo.

396 Portmann, S-ino A., Bourtzwiller,
Francujo.

397 Trésorier, F-ino, Besançon, Fran-
cujo.

398 Berger, S-ro J. G., München, Ger-
manujo.

399 Klünder, S-ro Willi, Burgsteinfurt,
Germanujo.

400 Michalik, S-ino Frieda, Hösel, Ger-
manujo.

401 Treude, D-ro Wilhelm, München,
Germanujo.

402 Wingen, S-ro Wilhelm, Köln-Sülz,
Germanujo.

403 Raynor, S-ro R. W., Nairobi, Kenjo

404 Rojas, S-ro J. A. Velez, Bogota,
Kolombio.

405 Symoens, S-ro Edward, Leopoldstad
Kongo Belga.

406 Frutoso, S-ro Meknes, Maroko.

407 Gomez, F-ino Angèle, Meknes,
Maroko.

408 Knecht, S-ro Fernand P., Casablan-
ca, Maroko.

409 Piétri, S-ro Lucien, Meknes, Ma-
roko.

410 Vidal, S-ro J., Meknes, Maroko.

411 Gouveia, S-ro M. M. Lourenço,
Funchal, Portugalujo.

412 Rego, S-ro M. Lopes, Lisboa, Por-
tugalujo.

413 Ahlin, S-ro E. V., Brovallen, Sve-
dujo.

414 Almén, S-ro Helmer, Stockholm,
Svedujo.

415 Almén, S-ro P., Hällefors, Svedujo.

416 Asp, S-ro B., Johanneshov, Svedujo.

417 Blondell, F-ino Maj, Stockholm,
Svedujo.

418 Dahl, S-ro Einar, Uddevalla, Sve-
dujo.

419 Ek, S-ro Axel, Hässleholm, Sve-
dujo.

420 Ekblom, F-ino Anna, Boden, Svedujo

421 Ericson, S-ro Å., Sköldinge, Sve-
dujo.

422 Eriksson, S-ro Bernhard, Stockholm,
Svedujo.

423 Fingalsson, S-ro B., Gisebo, Sve-
dujo.

424 Fingalsson, S-ro Harald, Gisebo,
Svedujo.

425 Fjordland, S-ro Sture, Karlskrona,
Svedujo.

426 Gerdman, S-ro Birger, Stockholm,
Svedujo.

427 Gustafsson, S-ro Karl E., Bergvik 2,
Svedujo.

428 Gustafson, S-ro Nils, Hällabrottet,
Svedujo.

429 Hakansson, S-ro Hugo, Trardyd,
Svedujo.

430 Hallgren, F-ino A. L., Stockholm,
Svedujo.

431 Hedberg, S-ro Johan, Bredbyn,
Svedujo.

432 Jacobsson, S-ro Johannes, Söderfors,
Svedujo.

433 Karlsson, F-ino Hilde, Klippan,
Svedujo.

434 Larsson, S-ro Carl, Västerås, Sve-
dujo.

435 Lind, F-ino Estrid, Stockholm,
Svedujo.

436 Lindberg, S-ro Fritiof, Häbygård,
Svedujo.

437 Lindberg, S-ro Torsten, Prässebo,
Svedujo.

438 Lindeberg, S-ino Britta, Malmö,
Svedujo.

439 Linnander, S-ino Siri, Stockholm,
Svedujo.

440 Ljungberg, S-ino Astrid, Stockholm,
Svedujo.

441 Möllestad, S-ro Sven, Kramfors,
Svedujo.

442 Näsland, F-ino E., Uppsala, Sve-
dujo.

443 Olsson, F-ino Agda, Göteborg,
Svedujo.

444 Ohlsson, S-ro Carl, Stockholm,
Svedujo.

445 Olsson, F-ino G., Strömsnäsbruk,
Svedujo.

446 Olsson, S-ro Sture, Strömsnäsbruk,
Svedujo.

447 Persson, S-ro Olle, Trelleborg,
Svedujo.

448 Schöllin, S-ro Oscar, Dyltabruk,
Svedujo.

449 Sjöberg, S-ro Helger, Gnosjö,
Svedujo.

450 Söderland, S-ro B., Kumla, Svedujo.

451 Syrjämäki, S-ro Matti, Kumla,
Svedujo.

452 Tell, S-ro Leander, Norrköping,
Svedujo.

453 Turner, S-ro Fred, Linköping,
Svedujo.

454 Unchitti, S-ro C. L., Bangkok,
Tajlando.

455 Pons, S-ro Valdo E., Colonia,
Urugvajo.

456 Baade, S-ro Martin C., Elk Grove,
Usono.

457 Gibson, S-ino Mary, J., Riverdale,
Usono.

- 458 Jones, F-ino P. O., Kansas City, Usono.
- 459 Solin, S-ro Paul, Sandiego, Usono.
- 460 Sparks, S-ro Robert, Avon, Usono.
- 461 Catalano, D-ro M. H., San Isidro, Argentino.
- 462 Iglesias Nunez, S-ro Eugenio, Buenos Aires, Argentino.
- 463 Ison, F-ino H. M., Ardleigh, Britujo.
- 464 Mills, F-ino Constance, Denton, Britujo.
- 465 Dessapt, S-ro Marius, Thiers, Francujo.
- 466 McCulloch, S-ro Robert C., Toul-Rosieres, Francujo.
- 467 Grabau, F-ino Maria, Hamburg, Germanujo.
- 468 Olafsson, S-ro Ingimundur, Reykjavík, Islando.
- 469 Campetti, Prof. D-ro Gaetano, Lucca, Italujo.
- 470 Muretti, D-ro Inĝ. Mario, Torino, Italujo.
- 471 Pipan, S-rom Bruno, Trieste, Italujo.
- 472 Sgroi, S-ro Rosario, Catania, Italujo.
- 473 Vaona, D-ro Attilio, Torino, Italujo.
- 474 Jovanoviĉ, S-ro Živojin, Niš, Jugoslavio.
- 475 Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando.
- 476 Benko, S-ro Adalberto, Montevideo, Urugvajo.
- 477 Bernhardt, S-ro Werner, Windhoek, Sudafriko.
- 478 Waal, S-ro Siem de, Pietermaritzburg, Sudafriko.
- 479 Cruz, S-ro A. B. Martins da, Benguela, Angola.
- 480 Abril, S-ino Irene de Araujo Monzon, Copacabana, Brazilo.
- 481 Bravo, K-lo Candido, Sao Paulo, Brazilo.
- 482 Florêncio, S-ro A., Rio de Janeiro, Brazilo.
- 484 Freitas, S-ro A. Wantuil de, São Cristovão, Brazilo.
- 485 Gaio, S-ro Jorge Manoel, Rio de Janeiro, Brazilo.
- 486 Leitão, S-ro José Manes, Rio de Janeiro, Brazilo.
- 488 Melo, S-ro J. Olívio, Rio de Janeiro, Brazilo.
- 489 Moraes, S-ro Arminio de, Rio de Janeiro, Brazilo.
- 490 Santos, S-ro Nelzito, Petrolina, Brazilo.
- 491 Severo, S-ro João Correa, Baje, Brazilo.
- 492 Souza, S-ro D. P. de, Rio de Janeiro, Brazilo.
- 493 Teixeira, S-ino Lila, Copacabana, Brazilo.
- 494 Trebbi, S-ino Yolanda, Porto a Legre, Brazilo.

KONKURSO MS

En la kvina lotumado la bona sorto indikis tute freŝbakitan membron, S-ron Živojin Jovanoviĉ en Niš, Jugoslavio, kiu startis ĉijare sian anecon de U.E.A. tuj kiel MS.

Ni kore gratulas S-ron Jovanoviĉ, ke tiel rapide la bonŝanco estis kun li. Malgraŭ la fakto ke pro valutaj malfacilaĵoj nia libroservo ne povas funkcii en lia lando, li tamen povas nun havigi al si valoran libron.

Kiu sekvos? Altigu vian kategorion al MS!

FONDAĴO-ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 1671.29 gld.

Novaj kontribuoj: H. V. Rasmussen, Danlando 5.47 gld.; K. Söderberg, Svedujo 7.35 gld.; "Ĉu vi estas tute sola en la mondo? Aspektas tiel. Rigardu tien. Komprenu, granda amaso pene portante grandan sakon, ne povas tiel rapide promeni kiel mi", 10.- gld.; S-ino R. Agaard, Nov-Zelando 5.33 gld.; J. Schulrat, Aŭstrujo 5.16 gld.; gld.; Grupo Marseille, Francujo 8.30 D-ro A. K. Beck, Britujo 13.18 gld.; N.N. en V, Nederlando 2 x 10.- gld.; F-ino S. Iliadi, Turkujo 10.- gld.; S-ro R. J. Kruiter, Nederlando 10.- gld.; "Gesamideanoj, bonvolu senprokraste malfermi unufoje larĝe vian monujon kaj la homaro mire rigardos" 5.- gld.; A. Criach, Hispanujo 1.44 gld.; D. Dalmau, Hispanujo 5.- gld.; W. Baaten, Nederlando 10.- gld.; N.N. en San Diego, Usono 41.46 gld.; Enrico Dondi, Italujo 6.- gld.; D-ro W. P. Roelofs, Nederlando 25.- gld.; F-ino M. H. Vermaas, Nederlando 15.- gld.; Svisa Esperanto-Societo 173.80 gld.; H. Kürsteiner, Svislando 21.72 gld.; S-ino M. Combebias 4.10 gld.; J. V. Holleman, Nederlando 10.- gld.; R. Sakowicz, Pollando 10.65 gld.; H. Oosthoek, Nederlando 2.50 gld.; F-ino P. Oosthoek, Nederlando 5.- gld.; H. V. Rasmussen, Danlando 5.36 gld.; Alfred Skyberg, Norvegujo 10.64 gld.; Trygve Raimar, Norvegujo 26.60 gld.; N.N. Kalifornio, Usono 41.53 gld.; S-ino M. Vandevelde, Belgujo, 15.20 gld.; J. A. Döbken, Nederlando 2.50 gld.; Avoto, Britujo 5.33 gld.; Prof. E. Privat, Svislando 21.30 gld.; Alfred Persson, Svedujo 11.02 gld.; Torsten Lindberg, Svedujo 14.69 gld.; Magda Carlsson, Svedujo 73.46 gld.; E. Bonander, Svedujo 3.31 gld.; J. J. Roelofs-Paulus, Nederlando 10.- gld.; L.E.E.N.-sekcio Amersfoort, Nederlando 17.- gld.; Teo Jung, Nederlando 10.- gld.; Ch. Decorte, Belgujo 76.- gld.; Francisco Mañez, Hispanujo 1.44 gld.; A. Humez, Francujo 4.15 gld.; J. Trésorier, Francujo 8.30 gld.; N.N. en V, Nederlando 10.- gld.; Helmut Gerbert, Aŭstrujo 14.75 gld.; F-ino Th. v. d. Reyden, Nederlando 10.- gld.; Erik Carlen, Svedujo 72.- gld.; Rudolf Linse, Svedujo 10.95 gld.; J. Derieuw, Belgujo 6.70 gld.; R. Slot, Nederlando 2.50 gld.; F-ino Rigmor Pedersen, Danlando 5.50 gld.; A. E. Rosengard Hansen, Danlando 5.50 gld.; I. Grahovac, Aŭstralio 9.32 gld.; I. V. Ahonen, Finnlando 4.68 gld.; I. Ekström, Finnlando 8.77 gld.; E. Hämäläinen, Finnlando 5.85 gld.; P. Kustaanheimo, Finnlando 23.40 gld.; A. Ljubotskij, Finnlando 2.34 gld.;

Ges. Larsen, Finnlando 17.55 gld.; V. Salonen, Finnlando 11.70 gld.; Ges. Stenholm, Finnlando 17.55 gld.; Ges. Vilkki, Finnlando 25.- gld.; Joh. May, Sarlando 8.30 gld.; J. Schunkel, Sarlando 4.15 gld.; H. Block, Sarlando 3.49 gld.; G. Feis, Sarlando 4.15 gld.; Gustav Ringstad, Norvegujo 5.32 gld.; Alfred Berntsen, Norvegujo 5.32 gld.; H. Thien, Nederlando 5.- gld.; Anders Persson, Svedujo 7.25 gld.; Rafael Gisbert, Hispanujo 1.80 gld.; Gefratoj Gaston, Hispanujo 72.- gld.; S-ro F. W. Taylor, Aŭstralio 9.19 gld.; J. Boer, Nederlando 5.- gld.; Reinhold Jensen, Danlando 8.- gld.; F-ino K. Brouwer, Nederlando 5.- gld.; H. C. Magel, Nederlando 7.99 gld.; P. Nicolai, Sarlando 4.78 gld. Entute 2893.58 gld.

Unu milono de jara enspezo — aŭ pli laŭ via plaĉo — por la Zamenhofa Jaro!

IMITINDA EKZEMPLO!

S-ino Elise Mayerhuber en Augsburg, Germanujo festis la 50-jaran datrevenon de sia esperantistiĝo. Okaze de tiu ĝojiga fakto ŝi donacis al U.E.A. la sumon de 25 GM. Ni tre kore gratulas al S-ino Mayerhuber, esperante ke ŝi ankoraŭ tre longe povos doni siajn fortojn al la movado, kaj plej sincere dankas al ŝi pro ŝia simpatia kaj malavara gesto!

DONACO AL LA ĜENERALA KASO
N.N., Aŭstralio 4.28 gld.

FONDAĴO-EKSPOZICIO

N. G. Nilsson, Svedujo, 3.89 gld.
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.
M. H. VERMAAS,
Direktorino C.O.

LA JARLIBRO DE U.E.A.

La Jarlibro Unua Parto aperis ĉijare tro malfrue — bedaŭrinde — pro reorganizo en nia presejo. Ni esperas tamen ke la plimulto de niaj membroj ricevis ĝin ankoraŭ antaŭ sia ferio. Ni firme esperas ke tia prokrasto ne plu okazos, ĉar la menciita reorganizo signifas, ke nia presejo, disponante pri pli da propraj maŝinoj, ankoraŭ pli firme havos la aferojn en la mano.

Sed ni devas apelacii al niaj membroj kaj al ĉiuj niaj regulaj kunlaborantoj, sendi al ni la bezonatan materialon por la Jarlibro nepre antaŭ la difinita tempo. Tro ofte okazas ankoraŭ ke oni sendas al ni informojn eĉ en marto anstataŭ en novembro!

Kiel vi rimarkis, denove la Jarlibro fariĝis pli dika, pli riĉenhava. Sed, tio signifas ankaŭ: pli multekosta. Por kovri tiujn ekstrajn kostojn, necesaj estas multege pli da reklamoj. Por tio ni petas la helpon de absolute ĉiuj membroj, delegitoj, landaj asocioj. Komencu varbadi jam nun por la Jarlibro aperonta en la Zamenhofjaro, Jarlibro kiu devos esti pli riĉa, pli impona ol ĉiuj antaŭaj. Se via loĝloko havas turismajn allogaĵojn — kaj preskaŭ ĉiu loko havas — klopodu

havigi reklamon de la fremdultrafika instanco. Se vi konas industriaĵojn aŭ komercajn entreprenojn, klopodu varbi reklamon de ili, emfazante ke nur pere de nia organizaĵo ili havas eblecon reklami en 80 landoj samtempe. Ne timu kontakti ilin. Nia reklamtarifo estas preskaŭ ridinde malalta por iliaj konceptoj.

Helpu plibeligi la Jarlibron kaj helpu ankaŭ igi ĝin pli senmakula. Atente tralegu ĉion kio koncernas vin kaj informu nin pri ĉiu eĉ plej eta malkorektaĵo.

Pri la rubriko "Aranĝoj esperantistaj" sur p. 87 ni petas novajn informojn kiel eble plej frue. Tuj post decido pri Kongreso, Konferenco, Jar-kunveno, la organizaĵoj bonvolu informi nin.

La rubriko "Denaskaj esperantistoj" estas terure nekompleta. Ni urĝe petas ĉiun esperantiston helpi kompletigi ĝin.

La delegita reto povas fariĝi ankoraŭ pli ampleksa. Se vi deziras fariĝi delegito, bonvolu anonci vin al la kompetenta instanco en via lando, sed bonvolu nepre unue tralegi la regularon sur paĝo 123 de la nuna Jarlibro kaj agi laŭe. Se vi konas aliajn esperantistojn, kiuj bone taŭgas por la menciitaj funkcioj, bonvolu influi ke ili anoncu sin, sed nepre ĉiu atentu la regulojn pri korekta lingvoscio kaj pri membreco. Fakdelegito estu nepre kompetenta, prefere profesiulo, pri la elektita fako.

Apartan atenton ni deziras doni al la Jarlibro Dua Parto de tiu ĉi jaro. Kiel jam anoncote, ĝi enhavos la Gastronomian Terminaron. Kiel same anoncote, bezonataj por ĝi estas multaj reklamoj de hoteloj, restoracioj, manĝejoj — kaj ankaŭ de manĝaĵoj. Devas esti varbeblaj reklamoj de pluraj fabrikoj, kiuj rekomendas siajn varojn: "Uzu margarenon de", "neniu manĝo estas kompleta sen enskatoligitaj.....", "ĉiu bona tagmanĝo finiĝu per kafo de", "je ĉiu manĝo trinku vinon (bieron) de" ktp, ktp. Sennombraj estas la eblecoj. Varbu, varbu! Utiligu la aldonitan varbilon. Atentu la limdatojn por ambaŭ eldonaĵoj! Por la tarifoj vidu Jarlibron I 1958, p. 47 k.s. Multan dankon anticipe. Ek!

M. H. VERMAAS,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Finna konstruisto volas korespondi pri dom-, voj-, kloak- kaj varmkonstruo kun la fakuloj. Aulo Minell, Keljonkangas, Keljo, Finnlando.

Aĉetas papermonon de Pollando, Rusujo, Sovetio kaj povas doni neuzitajn poŝtmarkojn usonajn. K. Jansson, 624 16th Ave., San Francisco 18 Cal., Usono.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

Por restarigo de esperantista lernejo ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon. Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj, diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

Pola geedziga oficejo "Swatka" havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. Ni havas kandidatoj(in) el pli ol 10 landoj laŭdezire. Skribu sekson, aĝon, intereson. Aldonu eble rpk. al "Swatka", Łódź, Piotrkowska 133, Pollando.

Esperanto parolata. Adresaro de entreprenoj kiuj uzas Esperanton: hoteloj, restoracioj, magazenoj, informoj, ktp. Tuj ĝin mendi al S-ro Rétot, 162 Boulevard Aristide Briand, Montreuil (Seine), Francujo: du respondkuponoj.

La Navigantoj. Örebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkoston korespondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkuponon — se havebla — vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

Letervespero okazos 3-an septembro. Skribu per il. pk. al Melbourne Esperanto-Klubo, Box 2122 T, Elizabeth Str. P.O. Melbourne, Aŭstralio.

Frant Patera, Ĉsl. armády 1027, Hořice v Podkr., Ĉeĥoslovakujo kaj 14 jara filino deziras korespondi tutmonde interŝanĝi p.m. ilustritajn p.k. kaj alumetglumarkojn. Respondo garantiita; validas ĉiam.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun filatelistoj en ĉiuj landoj. Mi havas jenajn prezlistojn: Michael, Sumstein, Yvert, AFA. (S-ro) Haukur Helgason, Box 13, Hafnarfjörður, Islando.

Unitarismo - Realigita Homaranismo. Mendu la ĵus aperintan 60-paĝan libron, kiu priskribas la kredon de unitaranoj kaj la realigon de la religiaj ideoj de Zamenhof; 11 steloj. Ni ankaŭ reeldonis "Life of Zamenhof" (Privat). 10 steloj. Pago al niaj perantoj en via lando eblas; Esperanto Press, Okaville, Ontario, Kanado.

Vizitu Fécamp, sur la Normanda marbordo. Petu senpagan informilon en Esperanto. Skribu al "Turismoficejo ESSI", Fécamp, (Seine Maritime), Francujo.

Junulo deziras korespondi tutmonde per magnetofono (9 cm/sek). John Gobourne, 44, Belmont Road, Wolverhampton, Anglujo.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Kataluna samideano deziras korespondi kun la tuta mondo, precipe pri montgrimpado kaj vegetarismo. Certe respondos. S-ro Ramón Fernández, Santa Rosa 5740, Santiago, Ĉilio.

Kiu volas inaŭguri sian vivon por Esperanto, tiu venu kiel kooperanto en la Esperanto-Hof, Schwanenstadt, Aŭstrujo. Skribu baldaŭ.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj multaj gegimnazianoj koreaj. Skribu al: Teaking Kim, c/o Unhyoun Kim, Kyoung Pook Oil Co., 20 Su Changdog, Taegu, Koreo.

Dum aŭgusto, du studentoj rondvojaĝos: Francujon, Germanujon, Nederlandon, Belgion. Dankos por proponoj pri loĝlokoj nokte. Allan Scott, 39 Shakespeare Ave., Hebburn, Co Durham, Anglujo.

La "Internacia Ludoĉambro", Hartmannsvej 23, Kopenhago/Hellerup, Danlando, bezonas helpon. Salajro laŭ kvalifikoj. 1) Infan-instruist(in)ojn, kiuj instruu kaj praktiku Esperanton kun la infanoj. 2) Junajn, bonedukitajn asistentinojn, kiuj helpu ĉe la infanoj, en la domo kaj en la ĝardeno. 3) Instruiston aŭ metiiston, prefere ambaŭ en unu persono; li havu variajn kvalifikojn, ĉar li praktiku ĉe la geknaboj, en la domo kaj en la ĝardeno. Interesuloj estu esperantistoj, kvakeroj kaj vegetaranoj.

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Unika verko pri
grava literaturo

Redaktis: **William Auld** kaj
Reto Rossetti

Eldona Fakto de U.E.A.

Prezo: 10.- gld.; 24.- steloj

Mendu ĉe U.E.A.

L O H R, La Spessart - enirejo,

la mont-arbarkronumita gastema franklanda urbeto apud la rivero Main kore invitas vin.



Informojn petu de "Esperanto-grupo LORANO"

Inĝ. W. Stockhausen, Lohr/Main, Germanujo, Rodenbacherstr. 17

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:

7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Administracio:

Per kio la infanoj ludas tra la mondo

Konkurso por amatoraj kaj profesiaj fotografistoj.

Limdato : 31-an de decembro 1958

Partoprenu la konkurson !

Atentigu la fotografistojn de via regiono !

Petu regularon ĉe :

Etnografia Muzeo

Internacia Salono de Fotografio 1959 **Neuchâtel**
(Svislando)

Aŭtunaj feriaj kursoj

estos denove aranĝataj en **La Sporta Altlernejo**
de **Veĵle, Danlando, 19.-26. de oktobro**, plej bela
tempo de la jaro, ĉar tiam portas ĉirkaŭaj arbaroj
luksan multkoloran veston. — Kursoj : konversacia,
perfektiga kaj daŭriga. Venu por lerni kaj ĝui.
Petu senpagan programon ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

Por la emantaj al normigita kaj simpligita lingvo
laŭ principoj de ekonomio vortara

**TUTA MATEMATIKO, MEKANIKO,
KOSMOGRAFIO**

Esperante pritraktitaj apud Aspa provo de logikaj
kaj precizaj terminoj kun signifa interpunkcio
330 terminoj el nur 1000 radikoj plejnombro
komunlingvaj. 200 tajpitaj paĝoj. Afr 2300 frankoj

Por fakuloj pri vojo

LEKSIKONO PRI VOJOJ

1200 Esperantaj terminoj de nuna ŝosea tekniko
kun difinoj. Afrankite 500 frankoj Francaj. Broise
inĝeniero pri publiklaboroj, rue Philippière **Longue**
(Maine et Loire), **Francio** poŝt.ĉekkonto Nantes 87479

BELARTO

Belega kajero, unika en la Esperanto-literaturo.

Multaj ilustraĵoj i.a. kolorbildo

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

Prezo : por membroj 2.75 gld. 11 st.,
por nemembroj 3.25 gld. 13 st.

LA TEATRAĴO DE LA 43-a: REAPERANTOJ

Majstroverko de **HENRIK IBSEN** en
traduko de **Oscar Bünemann**, ludota
dum la **Universala Kongreso en Mainz**.

Per ĝia aĉeto vi subtenas la funkciigon de
Internacia Teatra Trupo Esperanta.

Prezo: **0,75 gld.**

MENDU ĜIN ĈE U.E.A.!!!

GRAVA KOMUNIKO

POR LIBROSERVOJ KAJ LIBROAMANTOJ

U.E.A. transprenis la stokojn de **PORTUGALA ELDONA RONDO** kaj de nun vendas ĝiajn librojn kun eldonista rabato al revendistoj, je aĉeto de minimume 5 ekzempleroj.

Bonega kulturserio je ege moderaj prezoj

Taŭgega legaĵo por kursoj de progresantoj

Bonvenaj donacoj kiel premioj en klubaj konkursoj ktp.

Galileo Galilei (B. de J. Caraça) 1.70 gld.

Vivo de Zola (A. da Silva) 2.— gld.

Vivo de Nansen (A. da Silva) 0.50 gld.

Vivo de Pissarro (Rodo) 0.50 gld.

Vivo kaj Arto de Goya (A. da Silva) . . 0.50 gld.

La Vivo de l'Eskimoj (A. da Silva) . . . 0.50 gld.

Historio de Nederlando (A. da Silva) . . 0.50 gld.

Historio de Usono (A. da Silva) 0.50 gld.

La Portugala Literaturo (A. da Silva) . . 0.50 gld.

La Prahistoria Arto (A. da Silva) 0.50 gld.

La Budhismo (A. da Silva) 0.50 gld.

Pro tri Pingvenaj Ovoj (A. da Silva) . . 0.50 gld.

APERINTA!

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto
de

I V O L A P E N N A

Dua eldono reviziita kaj kompletigita

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A. aŭ ĉe la aŭtoro

Prezo : 11.— gld. bindita
9.— gld. broŝurita

Eldono de la aŭtoro



Dum la Kongreso en Mainz la aŭtoro
subskribos la verkon.